REGo

☆ RUSIA ESPERANTO-GAZETO ☆

movada revuo en kunlaboro kun REU *№ 2 (63) aprilo 2011*



en la numero

"Apero-5": faktoj kaj impresoj
Lingva Festivalo kaj aliaj aranĝoj en Uljanovsk
ĉiu popolo buŝas propramaniere
intervjuoj kun eksprezidantoj de REU
novaj versaĵoj, traduko kaj versgratuloj
"Bulteno de REU", novaĵoj, anekdoto kaj multo alia

Moskvo, 2011

enhavo

01 "Apero-5" en ciferoj kaj faktoj

02 "Apero": impresoj de partoprenantoj

05 "Apero" – kanto de Irina Gonĉarova

06 Ĉiu popolo buŝas propramaniere

10 Du festaj tagoj en Esperanto-rondo

12 Pri la litero "Y"

12 Juda humuraĵo de Josef Shemer

13 Prefiksaj E-vortoj mankaj en la rusa lingvo

16 Halina Gorecka bezonas helpon kaj subtenon

17 Intervjuoj kun eksprezidantoj de REU

20 Novaj REU-membroj por 2011

22 Kotizoj de REU/REJM por 2011

23 La 100-jara jubileo de V.A.Travin

24 Ĉe la fajro de kandelo

25 71-a Konferenco de la EK "Scio"

26 Omaĝe al Visockij

27 Henry Longfellow. La sago kaj la kanto (traduko de L.Novikova)

27 Novaj versaĵoj de K.Ilutoviĉ

k3 "Gratuloj por la jubileuloj" de M.Bronŝtejn



legu pri la 71-a Konferenco de la EK "Scio" en la p. 25

REGo

(Rusia Esperanto-Gazeto)

№ 2 (63) aprilo 2011

aperadas ekde 2000

redaktas **Garik Kokolija**
kunredaktas **Viktor Aroloviĉ**
kunlaboras **Maksim Griŝin**

materialoj de REGo povas esti represataj, kondiĉe ke la tekstoj restos senŝanĝaj kaj estos indikita la fonto

poŝta adreso: Pjatnickoje ŝosse 45 – 105
125310 Moskvo, Rusio
retadreso: <gazeto@mail.ru>

abontarifoj por 2011:

por loĝantoj de Rusio kaj aliaj landoj de KSŜ – 450 rubloj sendendaj al:
Коколия Георгий Владимирович
Пятницкое шоссе 45 – 105
125310 Москва
por loĝantoj de aliaj landoj – 25 eŭroj pagendaj al la konto **kklg-r** *ĉe UEA*

***elektronika abono** – 200 rub. (5 eŭroj)*

“APERO-5” EN CIFEROJ KAJ FAKTOJ



La datoj: 05-08-a de marto 2011.
La situo: Jerŝovo, 40 km okcidente de Moskvo.
La ejo: 10 ĉambroj kun 21 litoj en 1 dometo, troviĝanta en la 38-hektara teritorio de la antikva bieno de grafo Olsufjev kun parkego kaj lagetaro.
La manĝado: 3-foje tage, la kvanto de proponitaj en la manĝejo kaj konsumitaj pladoj nekalkuleblas.
La organizanto: EK MASI. La subvenciantoj: REU kaj EK MASI.
La celoj: E-parolado kaj ripozo en amika kaj malstulta etoso.
La labora kaj ĉiutaga lingvo: Esperanto.
La temoj: Lingvistiko, E-kulturo, E-movado.
La laŭtemaj programeroj: 14.
La ludoj: 15 (lingvistikaj, logikaj, intelektaj, surtablaj k.a.).
La festoj: la 8-a de marto kaj 3 naskiĝtagoj.
La sorte grava aĵo: gitaro. La kantitaj kantoj: nekalkuleblas.
La kanta vizitkarto de la aranĝo: “Apero”.
La flago: Esperanta. La koloro de festaj vestoj: verda-blanka.
La partoprenintoj: 24 personoj, el kiuj 14 inoj, 10 malinoj; la plej juna – 22-jara, la plej aĝa – 60-jara; 16 membroj de la Moskva junulara E-klubo EK MASI; 4 konstantaj vizitantoj de la Moskva E-klubo “Lev Tolstoj”; 20 REU-membroj; 11 REJM-anoj; 5 eksaj SEJM-anoj; 3 REU-estraranoj; 1 TEJO-estrarano; 1 direktoro de MEC; 1 ĉefredaktoro de “REGo”; po 1 gasto el Bratislavo, Rigo, Sankt-Peterburg kaj Tomsk; 3 komencintoj, 4 progresantoj, 17 fluparolantoj.
La Homo de la “Apero”: la komencantino, alportinta la gitaron, Ksenija Biĉkova.
La plej eksterlanda partoprenanto: Paŭlina Koĵuĥova (Slovakio).
La kerna programinfluanto: Ludmila Novikova.
La nemalhaveblaj personoj: Sergeo Straŝnenko (gitarludado), Garik Kokolija (financaj aferoj).
La dankendaj partoprenintoj: ĉiuj!
La sekva “Apero”: numero 6, dum februaraj festoj 2012 en la sama bazejo.
La grupo en “VKontakte”: <http://vkontakte.ru/event23289510>.
La fotoraporto pri Apero-5: en la rusa – <http://vkontakte.ru/album2101534_129749838>; en Esperanto – <http://vkontakte.ru/album-23289510_126339892>.

Irina Gonĉarova (Odincovo)

"APERO": IMPRESOJ DE PARTOPRENANTOJ

Stanislav Cukanov, membro de EK MASI, progresanto

Bedaŭrinde mi ĉeestis nur dum unu tago, des pli mi bedaŭras, ĉar tio estis mia unua E-aranĝo eksterurbe. Mi estis mirigita pri tio, kiom multe oni sukcesis organizi dum mallonga tempo. Bonega loko, tre agrablaj homoj, suna vetero – ĉio ĉi faris la renkontiĝon efektive neforgesebla. Preskaŭ ĉiuj partoprenintoj paroladas Esperante pli bone ol mi, kaj por mi tio estas grava, dum horoj mi aŭskultis, parolis mem, ludis. Alkutimiĝante al la sonoj de bona prononco, mi rimarkis finfine ke preskaŭ ĉion komprenas. Grandegan dankon al Irina Gonĉarova kaj al ĉiuj, kiuj helpis ŝin okazigi tiun feston, al ĉiuj, kiuj alvenis Jerŝovon por la renkontiĝo, inter kiuj estis eĉ eksterlandanoj, pro kio nia interna aranĝo de EK MASI iĝis internacia!

Darja Obrazcova, Sankt-Peterburg

Mi ŝatis viziti "Aperon"! Estis bonega etoso! Ni multe ludis, kantis, babilis. Mi ŝatis konatiĝi kun Ludmila Novikova kaj Sergej Straŝnenko. Krome mi rimarkis, kaj tio estis mirinda, ke ĉiuj partoprenantoj parolis nur en Esperanto! Mi ĝojis esti en "Apero"! Dankon al Irina Gonĉarova por tre agrabla kaj interesa renkontuiĝo!



Maksim Ĵitĉenko, membro de EK MASI

Plejparto de tio, kio okazis en ĉi tiu "Apero" jam estis en la antaŭaj. Sed okazis io nova, kaj la plej impresa por mi estis la informiĝo pri anarkiismo. Kvankam inter internaj ideoj de anarkiismo estas multo alloga, tamen la manieroj, elektitaj de la anarkiistoj, estas tute teruraj. Ilian muzikon ne eblas aŭskulti, eĉ la nomoj de la muzikaj grupoj aludas al morto: "Penduminto", "Sinmortpafinto" ktp. Ili ĉiam trovas por si malagrablaĵojn kaj nomas sin kiel danĝeraj homoj. Anarkiistoj havas sian sekcion en esperantista movado, kaj ilia flago – verda stelo sur nigro kaj ruĝo – aludas je piratoj kaj sango – eterna milito por la homaro sen perspektivo de feliĉo.

Anatolij Krasnokutskij, Volgograd

Kompare al antaŭaj "Aperoj" ĉi-foje partoprenis pli da aĝuloj. Sed venis la eksterlandanoj: Paŭlinka kaj Sergeo. Certe indas rimarki streĉan lingvan disciplinon. Eĉ ekster la oficiala programo mi ĉiam aŭdis de la partoprenantoj nur Esperanton. Kio ankoraŭ? Abundis komuna kantado, tio bonas. Mi memoras politikajn debatojn en la manĝejo – pri militoj, vegetarismo, ŝtatoj, kaj pri nia estonteco entute. Homoj havas sian vivpozicion kaj provis eldiri sian vidpunkton pri la diskutata problemo. Do la celo paroligi unu la alian estis atingita. Sed pri sukceso paroligi la novulojn mi dubas. Tamen ili sentis la etoson, tio jam ne malbonas por komenco.

Ilja Gimon



Tio estis mia unua E-aranĝo. Tial mi tute ne havis imagon kiel tio okazas. Sed kiam mi alvenis al la loko, kiam mi eniris la salonon, mi tuj eksentis, ke mi estas en la ĝusta loko, kun ĝustaj homoj kaj faras ĝustajn aferojn. Kaj tiu sento daŭris dum la tuta aranĝo. Min tre ĝojigis tiu etoso, tiuj homoj – novaj kaj jam konataj.

Marina Itpekova, membro de EK MASI

Mi dankegas ĉiujn partoprenantojn kaj, certe, la organizantojn (ĉefe Irina Gonĉarova) pro la renkontiĝo. Ĉar estis bonega etoso, tute esperantista: amika, eĉ familieca, gaja, kun amuzaj kaj evoluigaj ludoj, brilaj prelegoj, multaj naskiĝtagoj, kantoj kaj agrablaj promenoj. Kaj en tiu ĉi renkontiĝo mi povis konatiĝi kaj interkomunikiĝi kun ĉiuj. Kaj krome: al mi plaĉis renkonti ĉi printempon ĝuste tiel, kiel okazis en "Apero". Dankon, karaj! Mi amas vin!

Oksana Graĵdanova, membro de EK MASI, progresanto

Aranĝo "Apero" ĉiam plaĉas al mi, ĉar mi povas bone ripozi kun amikoj kaj praktiki la lingvon. Mi ĝojas, ke ĉi tie estis kaj konataj homoj, kaj ankaŭ la novaj. Al mi plaĉis ankaŭ, ke la programo estis tre diversa: ludoj, manlaboroj, prelegoj. Estis gitaro kaj kelkaj belaj voĉoj de kantistoj! La plej feliĉa afero estis gratula kanto al la virinoj dum la 8-marta koncerto. Mi povis ankaŭ iomete sportumi: mi naĝis kaj skiis. La tagoj de "Apero" kuris tre rapide, sed restis bona humoro.

Svetlana Gonĉarova, denaska esperantistino, membro de EK MASI

Mi tre ĝojis partopreni en ĉi aranĝo, ĉar ĝi donis perfektan eblecon denove ŝanĝi la lingvon de mia pensmaniero al Esperanto, almenaŭ por tri tagoj (eĉ kiam la renkontiĝo finiĝis, rusaj vortoj ankoraŭ kelkajn horojn ne volis reveni kaj anstataŭi la Esperantajn). Ankoraŭ unu grava por mi okazaĵo estis kantado de malnovaj tendaraj Esperanto-kantoj, kiujn mi aŭdis tra la tuta infaneco kaj tre ŝatas, sed malofte aŭdas esti kantataj. Perfektis laŭ mi la proporcioj inter viroj-virinoj, pliaĝuloj-junuloj, fluparolantoj-novuloj. Ankaŭ la bazejo al mi



unu el la "naskiĝintoj" estis Roman Boljŝakov

placis: pro la ebleco sportumi, pro la bongustega varia manĝaĵo, pro la apudaj rivero kaj arbaro. La etoso estis varma, la programo – vigla. Laŭ mi "Apero" estas tre bonkvalita E-aranĝo, kiu sukcesas pri sia celo: E-paroligi homojn. Dankon, karaj ĉiuj!



Sergej Straŝnenko, Rigo

Sincere: al mi ŝajnas, ke mian aperon dum "Apero-5" mi devas danki al nura miskompreno; sed – miskompreno feliĉiga, donanta multe pli da ĝuo ol da vanaj klopodoj! Ja tian kunfandiĝon de matura multjara E-renkontiĝa sperto kun freŝa junula entuziasmo, miksitaj kun ĉies verva strebo sukcesigi la aranĝon – ĉion ĉi mi ne spertis jam delonge. Neniel eblas klarigi neripeteblan atmosferon de vere plenkohera amika rondo funkcianta sen eĉ eta interrompo dum tri tagnoktoj – krom per kredo je reala ekzisto de la mistera "interna ideo" inter diversaĝaj homoj preskaŭ spontanee kunvenintaj en bela finvintra apudmoskva ripozejo. Nur la fortuno povis sorĉi, ke la malmulta tempo ampleksu plurajn naskiĝdatojn, aregon da revidoj post multjaroj kaj konatiĝoj tute surprizaj, tiom da seriozaj eventoj kaj amuzaj momentoj!.. Apenaŭ antaŭvidebla estis la neripetebla etoso de kunestado en medio plene hejmeca kaj amikeca. Eĉ la disiĝo en la fino de la renkontiĝo preskaŭ ne elvokis amaron, ĉar ŝajnis klare: ni disiras nur por renkontiĝi tre baldaŭ!

Andrej Griĉik, membro de EK MASI

Mi ŝatas, ke ĉi tiu "Apero" estis tiom internacia. Mi ŝatas amikecan etoson: malgraŭ ke multajn homojn mi ne konis, kaj aliajn mi ne vidis dum longa tempo, mi sentis min ĉirkaŭita de amikoj. Ludoj, la loko kaj la festo faris el la kunveno ne nur Esperant-lingvan trejnadon, sed ankaŭ bonegan ripozon.

Ludmila Novikova, Moskva E-klubo "Lev Tolstoj"

"Apero-5" estis modela. Mi ne ĝuis tiajn aranĝojn ekde la uralaj "Liroj": negranda varma rondo de samideanoj, optimala kombino de spertuloj kaj komencantoj, bonaj loĝkondiĉoj (aparta domo nur por esperantistoj), varia interesa programo, ebliganta en luda formo praktiki la lingvon. Necesas al estontaj "Aperoj" aldoni konkurson de talentuloj (verkantoj, tradukantoj kaj plenumantoj) – kaj ni revivigos "Liron". Dankon al vi pro la organizado de "Apero-5". Nepre daŭrigu la aferon!



APERO

Melodio de V.Ŝainskij por "Ĉunga-Ĉanga". Teksto de Mirinda Strigo

Nek proksime, nek en troa for',
Ĉu printempe, ĉu en vintra hor'
Ĝermo verda kreskas tra la neĝ',
Spite al la natureca leĝ'.

Refreno:

Ho, apero, jes, apero
De l' verdaĵ' sur nia tero,
Ho, apero – jen espero por movado.
Ĝojas ni, ke ja konstante
Ni parolas Esperante,
Ni parolas Esperante
Elegante.

Etendiĝas ĝermo al la sun',
Karesata de la varma lum'.
Kreskas soren, malgraŭ frosta plag',
Verdiĝante tagon post la tag'.

Nin salutas trilo de birdar',
Bonvenigas samideanar'.
Kaj popaŝe – vorton post la vort'
Plifirmiĝas nia lingva fort'.



ĈIU POPOLO BUŜAS PROPRAMANIERE

Ekde la studenteco mi preferis legi E-lingvaĵojn. La motivoj estis diversaj, komence – por plene ekposedi la lingvon, poste – pro ekzotike malrusaj lingveroj, kiuj estas kiel nova ornamaĵo kaj ankaŭ elnoti malruse novajn por mi manierojn sin esprimi. Estas jam publikigitaj esprimoj pri la profundo de silento [1, 2], kaj nun mi prezentas kolekton de esprimoj, en kiuj ĉefrolas la buŝo kaj la akcesoraĵoj (lango, lipoj ktp). Do temos pri paroloj.

Jam en unua jarcento de Esperanto-ekzisto estis verkistoj, kiuj pli preferis verki E-te ol nacilingve. Persone mi komprenas la preferon uzi mirindan vortfaradon de nia lingvo, anstataŭ ŝablonado de sia nacia lingvo. Sed ju pli da oni verkos E-lingve kaj tradukos al E-to, des pli da naciaj esprimoj venos al Esperanto, kaj ĉiu nova E-verkisto havos ĉemane pli-kaj-pli da nuancoriĉaj kolektoj por multaj situaci-esprimoj, kiaj ne ekzistas en aliaj apartaj naciaj lingvoj.

Ĉe tio povos okazi ke la naciaj esprimoj por konkreta situacio, ĉiam la samaj en la naciaj lingvoj, en Esperanto pro sia plureco po iom moviĝos disiĝi je pli nuancaj (ol nacilingve) semantikaj kampoj (kio ofte okazas ĉe enveno de novaj samsignifaj fremdaj vortoj en lingvon). Ekzemple por la esprimoj de babilado (v. sube) oni la esprimon "maĉi ĉifonojn" eble diros pri neinteresa babilado; "friti aeron" – pri vana babilado, "ekmueli pri" – pri tro detale babildiskuti, "grati la langon" – pri teda babilado. Tion difinos la praktiko de verkantoj kaj legantoj.

Mi tuj avertu, ke temas pri la "profesiaj" E-legantoj, kiuj legas E-aĵojn sen enmensa tradukado, kiam oni povas legostumbli ĉe renkonti nekutimaĵojn esprimajn.

Do, temas pri spertaj e-istoj, kiuj nur ĝuos la nekutimaĵojn, ĉar ilia nacia lingvo ne enmiksiĝas en la legadon. Se pli frue mi kategorie rifuzis la tezon, ke Esperanto estonte povas elpuŝi la naciajn lingvojn el la praktika uzado, nun mi jam enpensiĝas... Se jam ĉe apartaj personoj aperas deziro uzi E-ton pli ofte ol la nacian lingvon, ĉu ne iĝos tio amasa afero? Fakte, la esperantistoj devus kontribui, ke la naciaj lingvoj ĉiam restu uzataj, ĉar ili estos ĉiama fonto el kio ĉerpi la esprimojn kaj vortfaradon. Jam nun, laŭ mia opinio, Esperanto superas la naciajn lingvojn je esprimiva riĉeco. Sed por science pruvi tion bezonatas multaj esploroj.

En la kolekto mi apartigis la babil-esprimojn unualoken, kaj poste temos jam pri la paroloj. Babilotemon mi aparte ŝatas: ja kiaj interesaj kaj diversaj komparoj uziĝas diversnacie...

Por atingi pli vastan legantaron mi publikigas la kolekton en la rusia *REGo* kaj la eŭropa *Literatura Foiro*, ĉar la abonantoj kiuj abonas ambaŭ revuojn estas nur ĉirkaŭ deko. Tamen mi petas antaŭ ili pardonon.

Tiuj malsaĝaj kampuloj vidis la postsignon de tiaspeca kaŭĉukplanduma ŝuo kaj ili tuj **ventolas sian buŝon**.

I.Nagy, el la hungara, Z.Moricz, Varmega kamparo, HEA, Budapest, 1985, p. 78

Du horojn poste venis niaj amikoj el Stralsund (distrikto Rostock, GDR) kaj malfrue vespere ankaŭ tri personoj el Szczecin. La unuan vesperon ni preskaŭ senĉese **maĉis ĉifonojn pri diversaj temoj**.

Eles, or., Pollando, Esperantisto slovaka, 1985, 4, p. 9

– Nenion ni diros pri tio! Rakontu.
– Ne. Vorton de honoro! Ĉar vi scias, kia popolo estas en nia vilaĝo. Oni komencos **grati la langojn**.
V.A.Glazunov, el la rusa, Fonto, 91 (jul. 1988), p. 11-12

... sed li ne supreniris la ŝtuparon, li portis la fiŝojn rekte en la kelon, kie la vilaĝanoj rajtis eniri por admiri ilin, kaj ankaŭ por **babili pri ĉio kaj nenio** kun la populara salmokaptanto.
J.M.Rosbach, or., Norvegio, Silka kuseno, Oy Mendoservo Ak Finnlando, 1991, p. 13

Mi vekiĝis je la naŭa, ĉar hieraŭ ĝis malfrua noklto **floris la babilado** kun Maria, kiu venis...
Choe Taesok, or., Koreio, La Espero el Koreio, 1993, 1, p. 7

... se oni nur ĉeestas konversacion de maljunaj kamparanoj: eĉ se ili havas ion tre difinitan por diri, ili **longe rondiras ĉirkaŭ la poton**, kaj la ĉefaĵon ili enkondukas nur per aludoj, per flankaj ekprovoj.
Jakobo Verwej, or., Literatura Foiro, 175 (okt. 1998), p. 263

... kaj ni komencis iom konversacii pri itineroj, pri Junularaj Gastejoj, pri biciklaj akcesoraĵoj. Kaj trinkis teon. Longe ni **babilumis**.
Will Green, or., Monato, 1991, 9, p. 25

Intertempe ariĝis en la loĝejo de sinjorino Petrofil rondo de konatinoj, por "salvia vespero"... kaj apenaŭ ekzistas diferenco inter tiuj "salviaj rondoj" kaj la postaj kaforondoj. La virinoj ĝuis siajn tasojn kaj **babilis pri ovoj kaj bovoj**.
Leen Deij, Nederlando, Literatura Foiro, 160 (apr. 1996), p. 36

Iun tagon ŝia edzo trovis grandan bulon de oro dum li hakis arbojn en la montaro. Li tre ĝojis pro la oro, sed ankaŭ tre timis, ĉar lia edzino sendube **elbabilos tion en ĉiu direkto**.
Choe Taesok, el la korea, Kontakto, 2000, 5, p. 11

Kiam la ambulanco venis, atestantoj jam amasiĝis pretaj **ekmueli pri la tagnovaĵo**. Eĉ ne du dividis saman juĝon.
Jovemari Sarasua, el la eŭska, Fonto, 262 (okt. 2002), p. 10

... li prudente decidis ellasi ilin pro necerteco, ne sufiĉa valoro de la ŝtelaĵo kaj eblaj personaj implikiĝoj. Baldaŭ la ĉion sciantaj najbarinoj **svingis la langon**.
Salvador Guma, or., La Gazeto, 67 (dec. 1996), p. 28

Mia kritiko al la RP kaj al la Esperanto-Radikala Asocio (ERA) estis ke oni amase "**fritas aeron**" (itala esprimo, kiu signifas paroladi sensubstance) kaj...
Sabira Ståhlberg, tejo tutmonde, 1992, 3, p. 26

"Ĉu ne sufiĉas, ke li aneksis Alsacon kaj Lorenon? Ĉu li okulumas nun al Maroko?"
"**Paroloj en la venton!**" asertis la kuzo el Lixières...
Raymond Schwartz, or., Francio, Kiel akvo de l' rivero, eld. Dansk E-Forlag, Dan-

lando, 1977, p. 66

Li tuj **forpreni**s de Father la **parolon**.
Karl Schulze, el la germana, B.Brecht, Trigroŝa romano, Edition Leipzig, GDR, 1977, p. 314

– Ej, kiel bone li diris! Nu, li diris ĝuste! – eksplodis en ridegon la bopatrino. Nu, maljunulo, vi **prenis** ĉi tiujn **vortojn de sur mia lango**...
István Nagy, el la hungara, Zsigmond Móricz, Ĉiela birdo, HEA, Budapest, 1979, p. 15

June Fairmont, iom mirigita, malfermis **demandan buŝon**. Per fingrogesto, li mutigis ŝin.
– Sŝt! – Li svingis orelon al la vento, kiu...
Lorjak, or., Iluzioj, HEA, Budapest, 1982, p. 40

La patro volis ion respondi ankaŭ al tio, sed la filo **prenis la vorton el lia buŝo**.
Hillar Saha, el la estona, E.Krusten, Okupacio, Eesti Raamat, 1972, p. 10

– Tiam estu malpermesate al la tuta mondo, ke oni senkaŭze lian **nomon prenu sur la lipojn**.
I.Nagy, el la hungara, Z. Moricz, Varmega kamparo, HEA, Budapest, 1985, p. 134

Starante ĉe la flanko de la patrino, ŝi ekscitite rigardis ŝin. Ŝi pensis, ke estas ŝanco paroli, sed ŝi estis iom timema. La **vortojn venintajn en la buŝon ŝi englutis**.
Wei Yida, el la ĉina, Bakin, La Familio, ĈEL, Beijing, 1999, p. 38

Sed haltigitis ĵus parolo lia.
Kiam al lia gast' plej fontis kor'!
L' aliaj fratoj iris jen, jen venis,
Kaj nun **de lia buŝ' la vorton prenis**.
Willy Nüesch, el la germana, Fonto, 212 (aŭg. 1998), p. 10

Sed kiam la **parolo estis sur la lipoj**, li repensis...
S.J.Zee, el la ĉina, Por nova afero, nova maniero, eld. ĈEL, Ĉinio, 1959, p. 78

Se Miss esperantio ne estis elektita, tamen Lady esperanto ĉeestis en Zakopano.
El ŝiaj lipoj pendis Oleg Izjumenko: *Unu el la plej interesaj por mi prelegoj estis tiu de deputito de la EU-Parlamento Malgorzata Handzlik, kiu ...*
Heroldo de Esperanto, 11 (10 aŭg. – 31 aŭg.) 2005, p. 1

Tial do li lasis neparolitaj la **vortojn**, kiujn li **havis sur la lipoj**.
Karl Schulze, el la germana, B.Brecht, Trigroŝa romano, edition Leipzig, GDR, 1977, p. 29

Don Quijote miregis je la asertoj de la Kavaliro de la Arbaro, milfoje intencis nomi lin mensoga, kaj **havis la vorton ĉe la pinto de la lango**...
Fernando de Diego, el la hispana, La inĝenia hidalgo Don Quijote de la Mancha, eld. Fundacion de Esperanto, Hispanio, 1977, p. 466

Sed vi pretekstas la propagandon pri ia doktrino por sorĉi kaj sklavigi mian edzinon, kiu nun ĉiam **havas la vortojn** revolucio kaj lukto **sur la lipoj**.
Yang Yongsen, el la ĉina, Yang Mo, Kanto de juneco, 1-a parto, 1981, Ĉinio,

p. 157

Mi volis diri:
– Ĉar mi buĉos vin!
Sed la **voĉo sufokiĝis** al mi **ĉe la lango**.
Fernando de Diego, el la hispana, Camilo José Cela, La familio de Pascual Duarte, Barcelona E-grupo, p. 94

Laŭdire, kiu multe babilas, diras multon neutilan, **pro tro da parolo perdiĝas la kolo, kaj en fermitan buŝon ne enflugas muŝo**...
Fernando de Diego, el la hispana, Camilo José Cela, La familio de Pascual Duarte, Barcelona E-grupo, p. 72

Dum la afabla kaj improvizita kuriero diris ĉion ĉi, mi **pendis de liaj vortoj**, kaj miaj kruroj tiel tremis, ke mi apenaŭ povis stari.
Fernando de Diego, el la hispana, La inĝenia hidalgo Don Quijote de la Mancha, eld. Fundacion de Esperanto, Hispanio, 1977, p. 201

Sancho tiel spritadis, ke la servistoj de la domo, kaj la ceteraj personoj lin aŭdantaj, **pendis de liaj lipoj**.
Fernando de Diego, el la hispana, La inĝenia hidalgo Don Quijote de la Mancha, eld. Fundacion de Esperanto, Hispanio, 1977, p. 747

Sancho kvazaŭ **prenis liajn vortojn el lia buŝo**, ĉar li interrompis la hidalgon, dirante...
Fernando de Diego, el la hispana, La inĝenia hidalgo Don Quijote de la Mancha, eld. Fundacion de Esperanto, Hispanio, 1977, p. 580

Kamiona ŝoforo samtempe sakris kaj rapide bremsis, sed la **insulto svenis sur lia lango**.
Gerald C.Jervis, or., 25 jaroj, HEA, Budapest, 1977, p. 134

Li aŭskultis ŝin. Li ĉesis ripari la korbon kaj aŭskultis ŝin kun haltigita spirado. Lia sopira **rigardo pendis sur ŝia buŝo**.
Eduard Tvarožek, el la slovaka, Esperantisto slovaka, 1985, 2, p. 29

Ĉar la korteganoj, piede de la kolonoj, orelumis por **kapti** la plej malgravajn **vortojn el liaj lipoj**, li kutimis paroli ĉiam pli mallaŭte.
Marguerite Yourcenar, el la franca, La KromKancerKliniko, 19 (okt.-dec.2004), p. 11

Pri Gediminas sovetiaj historiistoj ja skribis, sed pri la personeco de Mindaugas **parolis** nur epizode kaj **duonbuŝe.**
Antanas Grincevičius, or., Litovio, Monato, 1997, 3, p. 13

[1] Kiel oni silentas ĉe diversaj nacioj. *La Gazeto, 81 (mart. 1999), p. 25-26.*
[2] Ĉiu esperantisto silentas gepatrolingve. *La KancerKliniko, 126 (apr. – jun. 2008), p. 15.*

Anatolo Gonĉarov (Krasnojarsk)

DU FESTAJ TAGOJ EN ESPERANTO-RONDO

La 24-25-an de marto en la Uljanovska ŝtata pedagogia universitato okazis Internacia scienc-praktika konferenco ***“Ĝermanistiko en la moderna tutgloba mondo:*** multkultura dimensio de studado kaj instruado de la germana lingvo”. Kadre de tiu ĉi konferenco estis aranĝitaj majstro-lecionoj, kiun partoprenis kvar E-klubanoj. Kvankam laborlingvoj de la konferenco estis la rusa kaj la germana, oni povis konatigi ĉeestantojn kun la internacia lingvo Esperanto, ĉar en Germanio troviĝas unika urbo, kiu oficiale portas la kromnomon, ligitan kun tiu lingvo. “Willkommen in der Esperanto-Stadt Herzberg! Bonvenon al la Esperanto-urbo Herzberg!” titoliĝis la programero, okazigita de Margarita Karceva, Elmira Kuĉatova, Julija Ravina kaj Irina Pleŝakova. Krom ili la programeron aktive partoprenis Tatjana Firsova, Oksana Aŝanina, Irina Zolotova, Lilija Bikbajeva – studentinoj de la fremdlingva fakultato. Ankaŭ 16 partoprenantoj de la majstro-klaso (urbaj kaj vilaĝaj instruistoj kaj studentoj) kun plezuro legis tekstojn pri la urbo kaj la lingvo, spektis komputilan prezenton pri urbaj vidindaĵoj, image promenis tra la urbo, vizitante la urban parkon, kie kreskas unikaj arboj, pririgardis la kastelan muzeon, aŭskultis orgenan muzikon de J.S.Baĥ en Nicolai-preĝejo kaj... gastis en Esperanto-Centro, kie ili partoprenis la germanlingvan kvizon pri Esperanto kaj ĝia kreinto Ludoviko Zamenhof. La kvizon gajnis vilaĝa instruistino Nina Galojan, kiu estis plej atenta dum la leciono. La gastoj ankaŭ vizitis ekspozicion, kie ili povis vidi fotitajn esperantaĵojn (medalojn, monerojn, poŝtkartojn, eĉ Esperanto-salaton kaj Esperanto-picon), E-librojn kaj gazetojn, vortarojn, kantaretojn, kalendaretojn. E-anguleto en la klasĉambro aspektis tre bone. La majstro-klason vizitis Doris Dold, DAAD-instruistino el Germanio, por kiu tiu ĉi temo estis tute ne konata. La scenaro de la prezentado estis publikigita en la antaŭkonferenca scienca artikolaro (dume nur en la germana lingvo). Kaj junie aperos ankoraŭ unu scienca artikolaro, kiun vi, karaj legantoj, povus partopreni, se vi serioze okupiĝas pri Esperanto. Bonvenon!



en E-centro dum majstro-leciono

La sekvan tagon en la universitato okazis la 9-a Lingva festivalo. Dum solena malfermo ĝin salutis Doris Dold. Gastoj de la festivalo estis DAAD-instruistoj Dennis Strömsdorfer, Simon Wordtmann (ambaŭ el Germanio) kaj Konrad Kalina (Aŭstrio). Ĉi-foje temis pri naciaj festoj. Tradicie plej multe da programeroj prezentis studentoj de la germana fako. Tradicie la plej vizitataj estis prezentoj de

la hispana, itala, hebrea lingvoj. Tradicie tre bone preparis siajn prezentojn reprezentantoj de tatara, mordva kaj ĉuvaŝa kulturoj. Unuafoje dum la festivalo sonis norvegaj frazoj kaj kantoj. Tre interese elpaŝis gestudentoj de la franca fako. Multajn demandojn respondis nia gasto el Zambio. La koncerton partoprenis studentoj el Gvineo-Bisaŭo, kiuj studas en la universitato nur tri monatojn. Ilia elpaŝo meritis admiron de la spektantoj.


prezento de la ĉuvaŝa lingvo

Vilaĝaj kaj urbaj lernejanoj estis tre kontentaj pri la festivalo. Niaj junaj geamikoj el malproksima vilaĝo Praskovjino, gvidataj de sia instruisto Sergej Mjakiŝev, promesis viziti la jubilean dekan festivalon kaj venigi geamikojn. Ili gaje ludis en Esperanto-salono, kie regis Jekaterina Ĵuravljova kaj Oljga Sirotinina. Al ili helpis Sergeo Abramov kaj Jurij Karcev. Entute estis prezentitaj 33 diversaj programeroj. Ni dankas al niaj konstantaj helpantoj el la agrikultura akademio, teknika universitato, sociala-pegagogia lernejo №1, armena kaj mordva societoj kaj al multaj, multaj aliaj. Precipe ni dankas al studentino Julija Rjabkova, kiu prezentis programerojn pri nepalaj, persaj kaj pakistanaj festoj. Pri nia festivalo eksciis Diana Mironova (Ufa), kiu ankaŭ preparis prezenton.

Nun ni atendos nian jubilean dekan Lingvan Festivalon.

Margarita Karceva (Uljanovsk)



PRI LA LITERO "Y"

En rusia Esperantujo oni povas trovi rilate la familinomojn kaj nomojn de urboj, regionoj, riveroj pli-malpli aktivan uzadon de la litero "y" el la latina alfabeto. Temas pri esperantigitaj formoj de nomoj.

Ekzemple, la nomon de la urbo Набережные Челны oni esperantigas kiel Nabereĵnyje Ĉelny. Nu, esperantistoj, kiuj scias la cirilan alfabeton, povas kompreni kaŭzon de la uzo de tiu litero. Sed min interesas demando, ĉu esperantistoj ne sciantaj la nuancojn de la rusa alfabeto povas korekte legi tion? Aŭ ĉu neesperantistoj povas kompreni en kiu lingvo tio estas skribita kaj kiel tion prononci?

En la germana "Y" estas prononcata kiel "ju" – dynamisch, aŭ "j" – Yeti, aŭ "i" – Yperit. En la finna "Y" estas prononcata kiel "ju". En la angla "Y" estas prononcata kie "j" – yellow, aŭ "ai" – why, aŭ "i" – cylinder.

Do neniu el tiuj sonoj taŭgas por bone prononci "Nabereĵnyje" aŭ "Ĉeboksary". Do por kio la uzantoj de tiu stranga literumado faras similajn konstruojn?

De alia flanko mi legas en la lernolibro de la akademiano Kolker pri alfabeto de Esperanto: ""i" estas prononcata kiel la rusa "и". Ĉar antaŭ "i" konsonantoj ne moliĝas, kiel en la rusa, "i" ... proksimiĝas al "ы"." Tio signifas, ke post la konsonanto "n" en la vorto "Ĉelni", kaj "r" en la vorto "Ĉeboksari", ni aŭdas sonon similan al la rusa "ы". Tial enŝovi la fremdan literon "y" en Esperantan alfabeton estas plene superflue.

Unu rusia sperta esperantisto rezonis al mi: "Gin aplikas tiuj, kiuj opinias grava rekonstrui la originan rusan nomon laŭ la Eaperanto-formo por distingi inter ekz. Лысов kaj Лисов. Estas konataj la kazoj de iamaj kaj nunaj E-istoj, preferantaj skribi "y" en siaj nomoj: Rytjkov, Lyskov k.a."

Nu vere neniu povas malpermesi al konkreta esperantisto nomi sin kaj skribi sian personan nomon tiel kiel al tiu plaĉas. Tamen laŭ mi por distingi Лысов-on de Лисов, sufiĉas la lastan skribi kiel Ljisov.

Tamen en REU ekzistas propra institucio – Ĉefa Atesta kaj Lingva Komisiono (ĈALK), kiu povus fari siajn aŭtoritatajn rekomendojn pri geografiaj nomoj skribataj en Esperanto-alfabeto, aŭ transskribo de familinomoj el la cirila alfabeto al la Esperanta. Tiel almenaŭ REU-funkciuloj kaj ceteraj REU-anoj devus sekvi la rekomendojn kaj ne kripligi la fundamentan alfabeton.

Mikaelo Ĉertilov (Moskvo)

Judo venas al konata kartaŭguristino.

Aŭguristino: Kiu estas via nomo?

Judo: Jan Kowalski.

Aŭguristino (post dismeto de kartoj): Ho ve, sinjoro Kowalski! Malbonon mi vidas! Via edzino seksumas kun najbaro kaj baldaŭ naskos al vi filon, kiu certe ne estas via. La najbarino, kun kiu vi amindumas, havigos al vi hontindan malsanon. La financaj aferoj iĝos fatalaj. Amikoj forlasos vin. Mortos vi neatendite kun teruraj turmentoj.

Minuto da silento. Fine la kliento viŝas ŝvitgutojn de sia frunto kaj diras: Dank' al Dio! Kiom bone esti singarda! Mia nomo ja tute ne estas Jan Kowalski, sed Abraham Kohen.

juda humuraĵo de Josef Shemer

PREFIKSAJ E-VORTOJ MANKAJ EN LA RUSA LINGVO

parto 3 [1]

Prefikso MIS-

Mis... La prefikso diras pri eraroj.
Obsedis min **misagoj** kaj **misfaroj**.
Dum mia viv' mi ofte **miskondutis**,
Mispaŝis, **misakuzis**, **missalutis**,
Misskribis, **miskorektis**, **misproklamis**.
Miskisis, **mispromenis** kaj **misamis**.
La vivon mi **misuzis** kaj eltrivis –
Do mi neniam vivis, sed **misvivis**.
Amikoj, tamen antaŭ nia diso,
Por ke ne estu ĝi definitiva,
Mi revas pri ankoraŭ unu "miso"
Se mi **mismortos**, do mi restos viva.

Mikaelo Giŝpling, or., Rusio, El sisma zono, Flandra E-ligo, Antverpen, 1994 (Repres. en Monato, 1996, 8, p. 21)

... nur la damo, sidiĝante, profunde suspiris kaj lasis fali la brakojn, kvazaŭ ŝi troviĝus konsumita kaj **misfarta**.

Fernando de Diego, el la hispana, La inĝenia hidalgo Don Quijoto de la Mancha, Fundacion de Esperanto, Hispanio, 1977, p. 275

Ke la persiko ankoraŭ dancis kun la venta O'Hara, same **misplaĉis** al li.

Karl Schulze, el la germana, B.Brecht, Trigroŝa romano, Edition Leipzig, GDR, 1977, p. 89

Tio signifas, ke en Svislando kreskas speco de **misfarto** ("malaise"). Kleruloj ne plu kredas je la "svisa modelo".

Tazio Carlevaro, or., Svislando, Literatura Foiro, 131 (jun. 1991), p. 28

Iuvespere, post malpeza manĝo je saŝimi kaj varma sakeo, Kej seducis min. Dum mi nun skribas, mi konscias, kia konfeso **misjapana** tia estas. Tio iom time min ĝenas. [seduci – konvinki iun kunamori]

K.Jakobo, el la angla, La Gazeto, 61 (dec. 1995), p. 15

Misrikolto kaŭzis malsaton kaj por la malfortaj fruan morton.

Leenart Deij, or., Literatura Foiro, 133 (okt. 1999), p. 31

De kie vi plukas tiajn ideojn? Vi sociumas kun **mistaŭgaj** homoj. Tiaj ideoj estas fremdaj al ni.

K.Jakobo, el la angla, La Gazeto, 61 (dec. 1995), p. 13

... eldonado de *Informilo por interlingvistoj (IPI)*, kiun redaktis Ryszard Rokicki, devis ĉesi pro ekonomiaj **miskondiĉoj** en Pollando.

Esperanto, 1992, 7/8, p. 137

[1] La unuaj partoj aperis en REGo №№ 6 (61), 2010; 1 (62), 2011.

Kaj vidante, la sekvantan tagon post la enterigo, ke Maria jam ekiris trenante ĉe la brido la ĉevalon, Bator, iu, **mislange**, insultmoke rimarkis: – Jen, rigardu nur, Fefeleaga! Kaj, de tiam ŝi estis nomata Fefeleaga.
Eugenia Morariu, el la rumana, Norda Prismo, 1972, 1, p. 36

Ibsen venis de malĝojaj kaj malĝojigaj cirkonstancoj; li estis malriĉa, li sentis sin **misŝatata**.
Johan Hammond Rosbach, or., Norvegio, Norda Prismo, 1967, 2, p. 80

Kun Kamaĉo mi ne renkontiĝis en 1988 aŭ 1989, sed en oktobro 1991, en Provenco. Kvankam li **mismemoras** pri la dato, jarojn poste li ne povas forgesi la similecon kun la...
Reinhard Haupenthal, or., Germanio, Literatura Foiro, 193 (okt. 2001), p. 266

Kiu, post lernado de la oficiala romanizo de la hindiaj lingvoj, konsentus skribi YAJADEVA-on en Esperanto por citi la poeton JAYADEVA? Aŭ ĉu kun prononc-helpa parentezo: JAYA (YAJA)? Kia **mishelpo**!
Jean Doublet, or., Francio, La Gazeto, 104 (jan. 2003), p. 19

Birdoj de eksterordinara varieco de specioj, grimpantoj kaj kurantoj, sugestiaj kantantoj kaj **mistonaj** paseroj kiuj vespere kunvenas sur la branĉojn.
Michel Clement, el la franca, Literatura Foiro, 196 (apr. 2002), p. 87

La suno brulis super la **miszorgita** paŝtejo kaj sekigis la koton sur la kurba vojo.
Paulo Sergio Viana, el la portugala, Fonto, 259 (jul. 2002), p. 7

Gelernantoj el Francio, Germanio, Hungario kaj Italio kuniĝis en unusolan studgrupon kiun d-ro Giorgio Silfer sukcesis gvidi malgraŭ forta **misnivelo** inter la partoprenantoj...
La Ondo de Esperanto, 2002, 5, p. 9

Je mia relativa kontento, la tria parto estas lingve pli adekvata, mi preskaŭ ne renkontis en ĝi tiajn monstraĵojn, kiuj **misornamis** la unuan.
Viktor Aroloviĉ, or., Rusio, REGo, 2006, 4, p. 53

Kiu povas scii, de kie alvenis la kerno? Arbarrande, laŭ tera vojo malofte irata, eble prunon manĝanta migranto forĵetis la kernon. Ĝi kaptis-tenis la teron kaj ekvivis. ...
Dum la unua jaro ĝi kreskis nur iom, perdiĝante inter la **misherboj**. ...
Sed en la sekvontaj du jaroj ĝi ekkreskis rapide, jam superis la **misherbojn**, kaj sufiĉe multe pluvis tiutempe.
Istvan Nemere, or., Hungario, Heroldo de Esperanto, 2006, 15, p. 3

Por Edmond Privat la idealo de la politika unuiĝo de la mondo en federa strukturo estis kuplita al la principo de la memdeterminado de la popoloj. Tio kondukis Edmondon Privat batali, dum kvindek jaroj, favore al la aferoj tre **misestimataj** de la samtempuloj.
Giorgio Silfer, or., Italio – Svislando, Heroldo de Esperanto, 12, 2007, p. 1

"De kie vi plukas tiajn ideojn? Vi sociumas kun **mistaŭgaj** homoj. Tiaj ideoj estas fremdaj al ni".

K.Jakobo, el la angla, La Gazeto, 61 (dec. 1995)

Prefikso PRA-

La nobela moŝto Marko Polo fariĝis grava persono ĉe la kortego de la imperiestro Kubilajo, kiu regis super la plej granda imperio de **praĉiamo**.
La Gazeto, 73 (dec. 1997), p. 29

Oni intuas, ke pratempe, en la primitiva planedo Tero, antaŭ multaj milionoj da jaroj, aperis la unuaj signoj de vivo. En **prasupo** aŭ buljono aperis la unuaj organikaj molekuloj, kiuj povis sin reprodukti.
Giordano Moya, or., La Gazeto, 79 (dec. 1998), p. 16

Persone mi plej ĝuis la aperojn de Ĵak Le Puil (nova KEF-stelo), Ĵomart kaj Nataŝa (bisaj steloj) kaj la roka aglomeraĵo Persone/Amplifiki (ĉiamverdaj **pra-steloj**).
Sten Johansson, or., Svedio, Esperanto, 1993, 11, p. 190

... apud kiuj kuŝis la anserplumetoj, kiuj ĝis la gingivo estis foruzitaj pri la streketoj kaj hoketoj, per kiuj de **pramemora** tempo malfermiĝas la enirejo al ĉia instruiteco.
Gerrit Berveling, el la nederlanda, Fonto, 212 (aŭg. 1998), p. 22

Prafraŭlino. Io el la malbonaj **pratagoj**. **Pramalnovaj** legendoj.
El kolekto de Klara Ilutoviĉ, marto 1998

Por mi poezio ne temas pri efemeraj eventoj, sed pri la esencaj fortoj, kiuj fluigas la homan sangon. La plejparto de artistoj portas en si specifan sintenon pri la vivo kaj fasciniĝon pri iu temo, kiun ili nepre devas esplori. Min interesas niaj **prakomencoj**, kiuj aktiviĝas kiel **pratipaj** bildoj.
Mi ne rigardas min poetino en ekzilo (mi aĝis nur du jarojn, kiam mi foriris), kvankam mi komence elektis la litovan lingvon kiel ilon por nia artesprimo...
Eugene de Zilah, or., Hungario-Francio, La Gazeto, 118 (apr. 2005), p. 11

Mi intencas diri, ke malprobable verkisto kiu serĉas en la arkanaj **pratavoloj** kaŝitaj en lingvo, en ties arketipoj, trovus en esperanto sian vojon: tamen...
Perla Martinelli, or., Italio, Literatura Foiro, 136 (apr. 1992), p. 86

La temo ja estis la biciklo de onklino Selma. ... Dum ŝi iris antaŭen senbrue, ŝajne senĝene, mi kun peno perknaris antaŭen sur antikva, iam-nigra rusto-riĉa **praciklo**.
Sten Johansson, or., Svedio, Fonto, 140, (aŭg. 1992,), p. 8

Por la aŭtoro ne la unua surpaperigita versio estas la originalo, sed la versio mense imagita: la **praoriginalo**. Por aŭtoro, tiaj du malsamaj versioj ambaŭ reprezentas la saman originalon.
Wouter F. Pilger, Survoje, 16, p. 24

Prefikso RE-

Al Ĉjo Juĉjo urĝas foriri. Li lasis la edzinon kaj la infanojn frumatene. La **resopiro** tiras Ĉjon Juĉjo al la domo, sed li atendas sian fraton.
Geraldo Mattos, or., Brazilo, Fonto, 258 (jun. 2002), p. 3

Gjarta ridis kaj batetis lin, por ke li estu kvieta; ja li estas infano, tute **reinfaneca**.
Finn Elwarth, el la dana, Fonto, 262 (okt. 2002), p. 28

Do **reek'** al universitata studado, kiu komencis esti por mi preskaŭ profesio.
Donald Broadribb, or., Anglio, La Gazeto, 60 (okt. 1995), p. 17

Ade kaj **re** la vizaĝo de Hant trudiĝis al ŝia menso.
Liven Dek, or., Literatura Foiro, 148 (apr. 1994), p. 101

Via kruĉa Moŝt' – li diras, –
"Bonan nokton mi deziras!"
ĉar la kruĉo ne **revortis**,
li surdorse ĝin elportis. ...
Esperantisto Slovaka, 1976, 2, p. 24

Konsideru fojon post fojo kaj **legu re kaj re** la nombron da konsiloj kaj instrukcioj...
Fernando de Diego, el la hispana, La inĝenia hidalgo Don Quijote de la Mancha, Fundacion de Esperanto, Hispanio, 1977, p. 683

Mi ŝovis min en hutonon profunde ĝis la mentono kaj fermis la okulojn. Kaj mi **remaĉe** pensis pri la hodiaŭa afero.
Sakamoto Syôzi, el la japana, Postmilita Japana Antologio, Japana E-librokooperativo, Osaka, 1988, p. 30

La hundido rekaŭriĝis antaŭ mi kaj **reokulis**...
Fernando de Diego, el la hispana, Camilo José Cela, La familio de Pascual Duarte, Barcelona E-grupo, p. 27

elnotis Anatolo Gonĉarov (Krasnojarsk)

Halina Gorecka, eksa vicprezidanto kaj estrarano de REU, iama redaktoro de "Bulteno de REU", kaj aktuale – eldonanto kaj administranto de la magazino "La Ondo de Esperanto" nun suferas gravan renan malsanon. Por efektivigi la operacion H.Gorecka bezonas helpon kaj subtenon. Oni povas helpi la elstaran aganton de Esperanto-movado diversmaniere, ekzemple aboni "La Ondon" por unu jaro aŭ fariĝi dumviva abonanto, aŭ kontribui al la savfonduso. Rusianoj povas pagi al:
Банк получателя: **Сбербанк России ОАО**. Отделение: 9038/01710.
БИК: 044525225. ИНН: 7707083893. КПП: 775003035. ОКАТО: 45286580000
Корреспондентский счёт: 30101 810 4 0000 0000 225 в ОПЕРУ МГТУ Банка России. Получатель: Горецкая Галина Романовна.
Номер счёта: 40817 810 4 3805 6109037.
Номер банковской карты: 67619600 0087136637.
Krome oni akceptas donacojn per **Яндекс.Деньги** (счёт 4100138523456) kaj per **PayPal** <sezonoj@gmail.com>.
Pli detale pri la manieroj de helpado oni povas legi rete: <http://sezonoj.ru/2011/03/savi-la-vivon/>.

Bulteno de REU

INTERVJUOJ KUN EKSPREZIDANTOJ DE REU

Daŭrigante serion de materialoj dediĉe al la 20-jariĝo de REU, ni publikigas mallongajn intervjuojn kun ĉiuj eksprezidantoj de REU, en kiuj ili koncize rakontas pri sia agado kaj prezentas proprajn vidpunktojn pri la nuna stato de REU. Sinsekvo de la intervjuoj estas kronologia. En la antaŭa numero de REGo aperis intervjuo kun Viktoro Aroloviĉ.

Andrej Grigorjevskij (prezidado: novembro 1993 – novembro 1994; februaro 2000 – marto 2001; majo 2005 – majo 2009; ĝis junio 2000 – sub la familinomo Ananjin).

– La unuan fojon vi iĝis prezidanto kiam la situacio en la lando ankoraŭ estis sufiĉe malstabila. Kiuj problemoj kaj malfacilaĵoj estis ĉefaj dum via unua prezidado?

– La vivo estis malstabila, sed ĝi daŭris. La ĉefaj problemoj estis sukcesi ŝanĝiĝi kaj adaptiĝi al la vivo same rapide, kiel okazis tiuj ŝanĝoj.

– Kies estis la ideo ĉesigi konkuradon inter REU kaj REA kaj finfine unuigi la organizaĵojn?

– Tio estis "popola ideo". La membroj (grandparte samaj en ambaŭ organizoj) kontraŭis al ekzistado de du tutrusiaj organizoj kaj aktive pledis por unueco, amikeco kaj paco.

– Ĉu estis iu granda diferenco inter la statoj de E-movado en Rusio en 1993 kaj en 2000, kiam vi prezidantiĝis la duan fojon?

– Parte ĝi estis kerne alia, parte tre simila. Malsama estis la movada kaj socia fonoj, simila estis la situacio de REU. Ambaŭfoje mi transprenis la gvidadon de la Unio fare de "teknikaj" estraroj, kiuj ĉefe okupiĝis pri formalaj demandoj, ne provante progresigi la organizon, meti antaŭ ĝi iujn celojn ktp.

– Verŝajne via tria prezidantiĝo estis kaŭzita de la sama deziro – progresigi la Union. Ĉu laŭ via opinio estis iuj sukcesoj ĉi-rilataj?

– Subjektive jes estis, sed mi ne vidas sencon listigi ilin. Se oni memoras, do bone, se ne memoras, do ne gravas.

– Kio laŭ vi estas ĝeneralaj problemoj de E-movado en Rusio tiam kaj nun (ne temas nur pri REU)?

– Kiel nun eblas retrospektive vidi, tiam estis la lastaj jaroj de la malnova movada modelo, kies akso estis amase partoprenataj aranĝoj (en kiuj establiĝis interhomaj rilatoj, etoso, kie oni ĉerpis energion por loke aktivi dum la jaro, entuziasmigis novulojn ktp ks).

Mi ne pensas, ke tiu modelo ne plu utilas, la vera kialo estas la generacia ŝanĝo. La nova generacio, por kiu venis la tempo "transpreni la torĉon", ne transprenis ĝin – ĉu pro internaj, ĉu pro eksteraj kialoj.

En la historio de sovetia/rusia E-movado mi rememoras kelkajn tiajn "generaciajn abismojn". Kutime ili ne daŭris malpli ol 5-10 jarojn, sed tio tre dependas de la cirkonstancoj.

– Vi estas konata kiel homo kiu foje levas maltipajn demandojn. Ĉu laŭ vi entute tia organizaĵo kiel REU estas nun bezonata en nia lando, aŭ unuopaj homoj plenumu apartajn privatajn iniciatojn (redaktorado, eldonado, organizado de renkontiĝoj)?

– Dum ekzistas almenaŭ kelkaj esperantistoj, kiuj deziras foje ion kune fari, oni bezonas ian interkonsenton pri la kunlabora maniero: legu "organizon". Se tio ne nomiĝus REU, tutegale estus io, nur kun alia nomo. Do, ĉiuj diskutoj pri tio, ĉu REU ekzistu aŭ ne, signifas nenion.

Nikolaj Gudskov (prezidado: novembro 1994 – oktobro 1995, decembro 2002 – majo 2005)

– Dum la Konferenco, kiu elektis vin, okazis unuiĝo kun Ruslanda E-asocio. Kiel kaj kial vi fariĝis la kompromisa kandidato por prezida posteno?

– La unuan fojon mi estis proponita por la prezida posteno en REU en Peterburgo fine de 1992, tion faris Gakalenko (cetere, ankaŭ la nomo de Miĥail Ĉertilov la unuan fojon eksonis kiel nomo de kandidato al la posteno tiam). En la liston por baloto mi ne eniris, ĉar rifuzis pro la jam decidita forveturo en Hungarion por longa tempo. Ĉu mi havis ŝancojn por esti elektita tiam, mi ne scias, sed en 1992 mi ja estis vicprezidanto ĉe Viktoro Aroloviĉ, kaj, mi esperas, sukcesis iom al li helpi en la laboro, do, oni min jam iom konis kiel potencialan kandidaton.

Meze de 1994 mi revenis al Moskvo kaj eklaboris en la eldonejo "Progreso" en redakcio, kiun gvidis Aleksandro Ŝevĉenko. Tiutempe en la sama redakcio laboris ankaŭ Andrej Ananjin, tiama prezidanto de REU, kaj liaj intertraktoj kun prezidanto de REA pri unuigo de la du landaj asocioj okazis antaŭ miaj okuloj – estis longa elektronikpoŝta korespondado. La principa interkonsento estis atingita, kaj en novembro 1994 en Niĵnij Novgorod la Kongreso konfirmis tiun decidon.

Tamen ĝuste surloke oni longe ne povis solvi la lastan demandon: kiun proponi kiel kandidaton por la prezida posteno en la unuigita organizo? Ja estis klara interkonsento, ke neniu el tiamaj gvidantoj de REU kaj REA estu, kaj krome, tiu, kiun proponos ili, jam pro tio havos avantaĝon dum la baloto. Estis tiel, ke mi ĉeestis dum tiu lasta diskuto inter ili, kiam ili alterne nomis diversajn personojn, kaj ĉiu proponita persono estis tuj rifuzata de la alia partopreninto... Kaj subite estis nomita mi. Ili demandis, ĉu mi konsentas. Mi estis tiom mirigita, ke nur jesis. Post kvaronhoro mi oficiale eniris la liston kaj ricevis komunan aprobon.

Fakte, nenio principa en la vivo de REU ŝanĝiĝis. REU kaj REA estis bazitaj sur tute malsamaj principoj. REU daŭrigis tradiciojn de ĉiuj antaŭaj esperantistaj organizoj, en kiu partoprenis ĝiaj aktivuloj: SEJM, ASE, SEU kun difinitaj labordi-

rektoj, formiĝintaj komisionoj, centra gvidorgano (kiel ajn ĝi nomiĝu) ktp. REA estis strukturita alimaniere, do la “unuiĝo” signifis nur ĉeson de nenormala situacio, kiam ekzistis du alternativaj landaj asocioj, nenio pli. Mi ricevis liston de REA-membroj, al kiuj estis proponita aliĝo al la unuiĝinta asocio, sed tio nemulton ŝanĝis reale. La informa kampo tiam ne multe ŝanĝiĝis en la lando, propraj por nelonge aperiĝantaj eldonoj de REU-Estraro ne stabiliĝis (nur Garik Kokolija 5 jarojn poste ŝanĝis la situacion, fondinte REGon), kaj mi sukcesis nur daŭrigi tion, kion oni faris en la antaŭaj periodoj. Mi ellaboris laborplanon, io efektiviĝis, io ne sukcesis, kaj la ĉefa mia atingo tiam estis tio, ke la asocio ne degeneris plene, sed eĉ stabiliĝis. Kurantaj teknikaj problemoj estis pezaj kaj temporabaj, sed ja plenumitaj.

Do, pri iuj movadaj sukcesoj dum mia prezidanteco post Niĵnij Novgorod mi ne povas fanfaroni, sed la movada krizo, karakterizinta la 1990-ajn jarojn ĝenerale, ankoraŭ ne forpasis, kaj apenaŭ iu alia sur mia loko tiutempe farus multe pli. Do, pri tiu periodo mi nek hontas nek fieras, kiel normala laborĉevalo, kiu honeste tiras sian ĉaron.

– Kion vi dum via unua mandatperiodo sukcesis fari, kion – ne sukcesis, kaj kiuj estis la kialoj de tio?

– La ĉefajn taskojn – unuigi kaj stabiligi la asocion – mi, al mi ŝajnas, plimalpli plenumis. Gravas, ke mi sufiĉe bone komprenis la ĝeneralan karakteron de tio, kio povas esti kaj kio ne povas esti la nuntempa E-asocio. Kion mi ne finfaris dum tiu mia prezida periodo, mi ja finfaris en la sekva, kiam mi estis vicprezidanto kun la ĉefa tasko registri la Statuton de REU laŭ la nova leĝo. Estis peza tasko (kiun mi jam konis kelkajn jarojn antaŭ tio, kiam helpis fari la samon al Viktoro Aroloviĉ), kaj mi ja finis tiun laboron. Dank’ al tio REU ekzistas kiel oficiala neregistara organizo ĝis nun.

– Sub kiuj cirkonstancoj vi denove konsentis prezidantiĝi – jam en la 2000-aj jaroj?

– Mi denove surprenis la taskon de prezidanteco simple pro tio, ke volis glate daŭrigi tion, kion faris antaŭ mi Andrej Grigorjevskij kaj Garik Kokolija. Garik tiam, bedaŭrindege, rifuzis plu esti la prezidanto, kaj iu devis “okupi la postenon” tiel, ke rezultoj de lia laboro ne perdiĝu. Mi estis pli-malpli taŭga por tio, ĉar mi estis en la antaŭaj estrarteamoj kaj sciis, kiel ne perdi la atingojn (ekzemple, organizadon de RET-oj, kiuj tiam estis novaj kaj sukcesaj aranĝoj) kaj ne fuŝi ion. Tamen, mi ripetas, tiutempe la plej bona gvidanto de REU estis ja Garik, kaj mi sen lia subteno la asocion gvidi ne povis. Sed la periodo jam estis stabila, kaj de konkreta gvidanto ne multo dependis: gravis ne forgesi fari necesajn rutinajn laborojn, kaj nenion bonan malhelpi. Oni ofte malbone vidas, ke por la Estraro plej gravas ne “estri” (kio en libervola asocio ĝenerale maleblas en serioza senco), sed bonorde plenumi rutinaĵojn, ne rimarkeblajn de ekstere. Por la horloĝo ja gravas ne laŭte tiktaki, sed montri precizan tempon! Sed gvidi la realan tempon la horloĝo ne kapablas, ke se ĝi rapidas aŭ malrapidas, tio nur montras, ke ĝi ne estas en ordo...

– Kio laŭ vi estas ĝeneralaj problemoj de E-movado en Rusio tiam kaj nun (ne temas nur pri REU)?

– Ĝenerala trajto de E-movado ekde la 1990-aj jaroj estas tio, ke ĝi ne funkcias kiel iu unueca sistemo, sed kiel apartaj sendependaj eroj. Tio estas ĝenerala trajto de diversaj sociaj fluoj kaj movadoj, esperantistoj tute ne estas iu escepto tiurilate. Landa asocio ne povas en tiu situacio ludi en la movado iun ekskluzive gravan rolon, sed ĝi estas nepre bezonata kiel iu centro, kiu povas iomete integri sufiĉe amorfan movadon, kunordigi informajn fluojn, entrepreni komune gravajn aranĝojn (kiel REK-oj), elpaŝi oficiale kun certaj iniciatoj, aŭ eĉ simple oficialigi certajn iniciatojn ktp. Do la movado principe povas ekzisti sen REU, sed kun REU ĝi povas ekzisti multe pli sukcese, kaj tial iujn servojn de REU uzas eĉ la homoj, kiuj deklaras ĝin nenecesa kaj senpova. Normala paradokso, kiu nur emfazas, ke landa asocio estas bezonata. Se integradaj tendencoj en la socio ĝenerale kreskos, aŭtomate kreskos ankaŭ signifo de REU kiel ĉefa esperantista strukturo.

Dum la lastaj 20 jaroj konstante kreskis la signifo de Interreto – kaj ĝenerale en la socio, kaj, certe, en E-movado (paralele malkreskis signifo de aliaj informiloj, kiel papera korespondado, radiofonio, eĉ paperaj gazetoj). Feliĉe, gvidantoj de la rusia movado eĉ pli frue ol esperantistoj en pluraj aliaj landoj tion eksentis kaj ekuzis (jam meze de la 1990-aj pluraj aferoj efektiviĝis helpe de la reto, ekzemple, la unuiĝo de REU kaj REA). Sed ekde komenco de la nuna jarcento la movado ĝenerale enprofundiĝis en la reton, kaj tio elvokis seriozan malinteresiĝon pri iuj aliaj formoj de aktivado. Nun la socio, kaj ankaŭ esperantistaro disfalis je du malbone komprenantaj unu la alian klasoj: uzantoj de la reto kaj neuzantoj (al la lastaj apartenas pluraj, sed ne ĉiuj, reprezentantoj de pli aĝaj generacioj). Esperantista mondo venos finfine al iu bilanco inter elektronika kaj viva formoj de la agado, sed por tio estas bezonata signifa tempo.

– Ĉu vi vidas iun perspektivon por REU en la estonto?

– El ĉio dirita klaras mia starpunkto: sen landa asocio la movado estus kaj estos malpli efika ol kun ĝi, sed grado de ĝia influo povas esti malsama. Mi certas, ke necesas trovi novajn formojn de ĝia funkciado pro novaj sociaj kondiĉoj kaj pro kreskanta influo de la Interreto, pri tio profete (sed tro antaŭtempe kaj tro dokte rigide) parolis Anatolo Gonĉarov jam antaŭ pli ol 20 jaroj, tion ni provis iom efektivigi en 2009. Sed la "popolo" verŝajne por tio ne plene pretas, kaj, anstataŭ perfektigi la reformojn aŭ proponi iuj aliajn, oni decidis reveni al la skemo de 1990-aj. Nu, eble, ankoraŭ ne venis por tio tempo. Sed mi certas, ke post kelka tempo estos trovitaj formoj de organizo de REU, pli adekvataj al la formiĝanta socia situacio, kaj ĝia signifo kaj aŭtoritato (ankaŭ nun por objektiva homo ne negebla) kreskos.

intervjuis Grigorij Arosev (Moskvo)

NOVAJ REU-MEMBROJ POR 2011

MECENATOJ

Kudrjavceva Rafija (Jekaterinburg)

INDIVIDUAJ MEMBROJ

Bokarjova Antonina (Moskvo), Bronŝtejn Mikaelo (Tiĥvin), Gadirova Diljara (To-

boljsk), Goroĥova Natalija (Murmansk), Gromov Viktor (Mineraljnije Vodi), Kacko Stanislav (Novosibirsk), Kotljarov Stanislav (Sverdlovska reg.), Kudrjavcev Viktor (Jekaterinburg), Rjabĉun Valentina (Moskvo), Sokolova Evelina (Krasnojarsk)

<u>FAMILIAJ MEMBROJ</u>

Ĥodusova Mila (Mineraljnije Vodi), Karapetjan Rustam (Krasnojarsk)

<u>ALIĜINTAJ KOLEKTIVOJ</u>

Esperanto-klubo "Verda fajreto" (Ĉusovoj) (5 membroj): *Fetisova Alevtina, Jarilova Anastasija, Kerner Lilija, Perevalova Oljga, Sultangulova Sofja*

Esperanto-klubo "EK MASI" (Moskvo) (+ 7 membroj): *Biĉkova Ksenija, Derbasov Miĥail, Fjodorov Maksim, Gonĉarova Svetlana, Itpekova Marina, Legornev Aleksej, Sidorkova Varvara*

Samara E-organizo (14 membroj): *Agafonova Ljudmila, Aleksejeva Oljga, Alfjorova Jelena, Aljakina Ljudmila, Dovgij Vladimir, Fejgin Igorj, Koĉergina Rimma, Korĥov Jevgenij, Kuznecova Jelena, Medvedeva Natalija, Poljanskaja Jelena, Prilepskaja Marija, Purigina Emilija, Suslov Vjaĉeslav*

Tiĥvina Esperanto-klubo (13 membroj): *Baraŝkov Vasilij, Belova Tatjana, Cvetkova Darja, Djomuŝkina Nina, Kaĉalova Zoja, Koroteckij Aleksandr, Krejson Inga, Loĵkina Jelena, Rajskaja Natalija, Ŝmonina Nina, Tiĥomirova Oljga, Vlasova Vera, Zdrogova Nadeĵda*

Volgograda EK "Espero" (6 membroj): *Bikova Ljudmila, Birjukova Irina, Dumler Vera, Loskutova Nadeĵda, Spicina Valentina, Vtorova Tatjana*

Uljanovska E-klubo (26 membroj): *Abramov Sergej, Aleksejeva Galina, Aljoŝina Jekaterina, Bikov Aleksandr, Ĉumakov Dmitrij, Fajzraĥmanova Fira, Ĵuravljova Jekaterina, Kaĉalov Ivan, Karceva Margarita, Karceva Marija, Kondratjeva Ljubovj, Kuĉatova Elmira, Kuljbakova Ljudmila, Kuzjmina Tatjana, Paveljev Nikolaj, Pleŝakova Irina, Ravina Julija, Saveljeva Nadeĵda, Sibgatulina Sajdja, Sirotinina Jelena, Sirotinina Oljga, Terentjeva Oljga, Trifonova Vera, Vanjko Raisa, Vildanova Ajgul, Zajceva Ljubovj*

EK "Pacifiko" (Vladivostok) (25 membroj): *Abisova Ljudmila, Ameljĉenko Iraida, Belickij Sergej, Ĉernova Marina, Dubrovskaja Ljubovj, Gorbunova Violetta, Grinj Jelena, Ivanov Andrej, Karpeta Ljubovj, Kisljakova Svetlana, Koneva Galina, Kuznecova Aljbina, Matvejenko Valentina, Neunilova Nadeĵda, Nikiforov Leonid, Paravin Valerij, Ponomarenko Eljvira, Rimova Nina, Ŝekunova Ljudmila, Ŝeremetjeva Svetlana, Ŝlepĉenko Gennadij, Timĉuk Valentina, Titajev Aleksandr, Udovickaja Nadeĵda, Vojnova Nadeĵda*

<u>Plena aktuala listo</u> de la membroj troveblas en la ttt-ejo de REU laŭ la adreso <http://reu.ru/membrolisto/>.

KOTIZOJ DE REU/REJM POR 2011

Membri en REU oni rajtas ekde la aĝo 18 jaroj; 14-17-jaruloj rajtas aliĝi kiel kandidatoj.

Individua kotizo – 200 rub. (por ekster-KSŜ-anoj – 20 eŭroj) ĝis la 28-a de februaro 2011, 250 rub. (por ekster-KSŜ-anoj – 25 eŭroj) ekde la 01-a de marto 2011; inkluzivas la membrokarton, Jarlibron/Manlibron de REU, Bultenon de REU en elektronika formo (laŭpete – en la papera) kaj aliajn informojn de REU, voĉdonrajton en Konferenco de REU, rabatojn en E-aranĝoj de REU.

Mecenata kotizo – 500 rub.; inkluzivas ĉion la saman kiel por la individua kotizo, krom unu escepto: sur la membrokarto estos skribita "Mecenato de REU".

Dumviva kotizo – 5000 rub. (por ekster-KSŜ-anoj – 500 eŭroj); inkluzivas ĉion la saman kiel por la individua kotizo dum la tuta vivo.

Familia kotizo – 100 rub.; inkluzivas la membrokarton, voĉdonrajton en Konferenco de REU, rabatojn en E-aranĝoj de REU. La familiajn kotizojn rajtas pagi samadresaj parencoj de individuaj, dumvivaj aŭ mecenataj membroj.

Kolektiva membrokotizo – 70 rub. por ĉiu aligita membro (la aliĝintaj kolektivoj pagas minimume por 5 aligitaj membroj); inkluzivas po 1 ekzemplero de REGo kaj Jarlibro/Manlibro de REU por kluboj kun 5-15 aligitaj membroj kaj por ĉiu aldona deko de la aligitaj membroj, aliajn informojn de REU por la kolektivo; la membrokartojn, voĉdonrajtojn en Konferenco de REU, rabatojn en E-aranĝoj de REU por la aligitaj membroj.

Aliĝkotizo – 300 rub., unufoje pagata de nova aliĝinta kolektivo. La jamaj aliĝintaj kolektivoj ne pagas ĝin. La nova kolektivo iĝas regiona organizaĵo de REU kaj laŭpete ricevas dokumenton pri tio. Se la kolektivo ne pagas kotizojn por aligitaj membroj dum du sinsekvaj jaroj, ĝi estas konsiderata likvidiĝinta kaj poste devus denove aliĝi al REU.

Amiko de REU – senpage; inkluzivas partoprenrajton (sen voĉdonrajto) en Konferenco de REU, Bultenon de REU en elektronika formo kaj aliajn informojn. Oni rajtas aliĝi kiel "Amiko de REU" nur unufoje. Persono, sin anoncanta "Amiko de REU", devas plenigi aliĝilon kaj mencii sian retadreson.

Rabatita abono de REGo – 400 rub. (ekster Rusio – 20 eŭroj), por ĉiuj membroj. La dumvivaj membroj, kiuj pagis sian kotizon en 2001-2003, plu ricevados REGon sen aldona pago.

Ĉiuj membroj de REU kun la aĝo malpli ol 31 jaroj aŭtomate iĝas membroj de la junulara sekcio REJM (Rusia Esperantista Junulara Movado) kaj ricevas voĉdonrajtojn en REJM-voĉdonoj.

Membroj de REU iĝas aligitaj membroj de Universala Esperanto-Asocio, la malpli ol 31-jaraj – ankaŭ de TEJO.

Aliĝilojn, rublajn kotizojn kaj rabatitajn abonpagojn por REGo sendu (poŝtmandate) al: ***142717, Московская область, Ленинский район, п/о Развилка, до востребования, Наталье Николаевне Шороховой***; eblas ankaŭ pagi per la sistemo **Yandex-denjgi**, numero de la "monujo" estas ***41001612527392***. La eŭraj kotizoj pagendas al la konto **reua-p** ĉe UEA.

Eksciu, ke...

LA 100-jara JUBILEO DE VALENTIN ALEKSEJEVIĈ TRAVIN



Valentin Travin naskiĝis en la urbo Sizranj (Samara gubernio) la 6-an de aprilo 1911. Lia patro estis librotenisto. Lia patrino ne laboris: ŝi edukis tri gefilojn. Valentin finis teknikan lernejon. Li okupiĝis pri radiotekniko. Jam en juneco li interesiĝis pri Esperanto. En lia hejma librokolekto estas romano de I.Turgenev "Patroj kaj filoj". Sur la titola paĝo estas surskribo: "Mi ricevis tiun libron en la jaro 1929".

Li frue edziĝis. Lia fianĉino estis tiam tre juna deksepjara knabino, li mem estis deknaŭjara knabo. La geedzoj havis tri gefilojn. La plej juna estis Nataŝa, kiun ni vizitis la 20-an de marto antaŭ la naskiĝtago de jam bedaŭrinde mortinta jubileulo. Lia edzino Nina naskiĝis en familio de komercisto. Ŝi estis arestita en 1943, ĉar (laŭ la vortoj de Nataŝa) ŝi kritikis iun estron. Post unu jaro oni liberigis kaj rerajtigis ŝin. En 1945 naskiĝis Nataŝa. Ŝiaj du fratoj ĝojis pri tio.

Multaj esperantistoj estis arestitaj en 1937. Valentin evitis tiun sorton, ĉar li estis en malsanulejo pro skarlatino. Verŝajne, ankaŭ pro tio, ke li loĝis en la urbo nelonge kaj neniu sciis pri lia E-okupo.

Dum la milito Valentin Aleksejeviĉ laboris en la Uljanovska urba radiodissenda centro, poste en projekta instituto, kaj revenis en la radiodissendan centron, kiam li iĝis sesdekjara. Tiam oni povis aŭskulti per radio versaĵojn de A.S.Puŝkin en Esperanto.



la familio de V.A.Travin

Valentin Aleksejeviĉ korespondis kun geamikoj el multaj landoj. Li vizitis Pollandon.

Tamen nekonata fakto estas, ĉu li vizitis la naskiĝurbon de la Esperanto-kreinto Ludoviko Zamenhof.

Li estis ne nur tre bona radioinĝeniero kaj esperantisto. Li estis tre bona, saĝa homo kaj intelektulo. Ĉiuj kolegoj ŝatis lin. Li estis ankaŭ bona patro de la familio. Valentin Aleksejeviĉ Travin forpasis la 24-an de februaro 2004. Lia amata edzino Nina mortis en 2003.

Jelena Sirotinina (Uljanovsk)



esperantistoj el diversaj urboj vizitis V.Travin en la jaro 2000

ĈE LA FAJRO DE KANDELO

"Mi amis vin. Ankoraŭ amo mia
Ne mortis tute en tremanta kor'..."



Tiamaniere en Uljanovska Esperanto-klubo komenciĝis la februara programo "Ĉe la fajro de kandelo", kiu estis dediĉita al la mondfama rusa poeto A.S.Puŝkin.

Malnova kamena salono. Kandeloj. Romancoj. Versaĵoj. Aŭdiĝis nur Esperanto. R.V.Vanjko rakontis biografion de la poeto, kies literatura agado komenciĝis en la liceo. Aleksandr Sergejeviĉ kreis multajn versaĵojn kaj romantikajn poemojn, kiujn deklamis niaj esperantistinoj: L.A.Kuljbakova (*Ne kantu, kara belulin'...*), Z.H.Sibgatulina (*Sur holmoj de Gruzi'...*) , L.P.Zajceva (*Portreto*), G.J.Aleksejeva (*Mi amas vin*),



F.F.Fajzraĥmanova (*La aŭtuno*), E.A.Sirotinina (*En brusto brulas flamdeziroj...*).

Interesan kvizon "Ĉu vi bone konas versaĵojn de Puŝkin?" preparis M.J.Karceva. Fragmentoj el versaĵoj kaj fabeloj sonis en Esperanto. Kompreni kaj diveni, el kiuj verkoj ili estis, estis malfacila tasko. Sed ni sukcesis.

Poste ni spektis la filmon pri Boldino – gepatra bieno de Puŝkin. La unua vizito de A.S.Puŝkin en Boldino estis antaŭ lia edziĝo kun la juna belulino Natalja Gonĉarova. Tie Aleksandr Sergejeviĉ verkis preskaŭ kvindek verkojn dum tri aŭtunaj monatoj. Tie estis kreitaj: "Malgrandaj tragedioj", "Noveloj de Belkin", "Dometo en Kolomno", "Fablo pri popo kaj lia laboristo Balda", la lastaj ĉapitroj de "Eŭgeno Onegin". Krome tie aperis pli ol tridek versaĵoj. En Boldino la poeto kreis precipe bone kaj feliĉe, al tio kontribuis kaj lia soleco, kaj lia proksimeco al la naturo.

Por la aranĝo la regiona biblioteko preparis ekspozicion pri la poeto. Dank' al L.I.Lobina kaj G.A.Zinovjeva ni povis rigardi multajn interesajn albumojn kaj librojn.

Raisa Vanjko (Uljanovsk)

71-a KONFERENCO DE LA EK "SCIO"

De la 28-a de februaro ĝis la 4-a de marto 2011 okazis vica, jam la 71-a, Konferenco de la Klubo de sciencistoj-esperantistoj ĉe Moskva Unio de sciencaj kaj inĝenieraj sociaj unuiĝoj (MUSISU). La konferencan programon ĉi-foje preparis iniciata grupo funkcianta kiel portempa kluba gvidanto. Tiel la klubo konservis la pozicion post la plej malfacilaj sortobatoj, forprenintaj pasintjare la longtempajn gvidantojn V.M.Ĥmelinskij kaj V.A.Edelŝtejn.

Kiel kutime, la Konferenco de la klubo estis aranĝita en la halo de la Prezidantaro de MUSISU. Kun granda atento kaj intereso estis aŭskultitaj la raportoj de astronomo kaj vojaĝanto V.A.Romejko (pri Nov-Zelando), esploristo de la moskva arkitekturo D.V.Graĉov (pri arkitekto Konstantin Ton), veterano de Esperanta movado kaj vojaĝanto V.V.Korĉagin (pri vojaĝo tra Eŭropo), la Prezidanto de Rusia Esperantista Unio G.L.Arosev (pri la nuna situacio en REU kaj laboro de ĝia gvidantaro). Dum la fina tago de la Konferenco klubanoj konatiĝis kun diversaj Esperantaj periodaĵoj.

En la ĝenerala kunveno de la klubaj membroj, dum la unua tago de la Konferenco, oni decidis ke la klubon plu gvidu kolektiva organo – Konsilantaro. Kiel

egalrajtaj konsilantaranoj estis unuanime elektitaj A.J.Bokarjova, N.B.Lisova kaj A.V.Nistratov. Ĉe bezono ili rajtas koopti ankoraŭ du konsilantaranojn.

La detalojn eblas vidi ĉe <http://ekscio.narod.ru>.

Ergard Budagjan (Moskvo)

OMAĜE AL VICOCKIJ



Okaze de la naskiĝtago de Vladimir Visockij Uljanovska Esperanto-klubo invitis geamikojn al festa vespero. La 30-an de januaro okazis kunveno en malgranda, tamen komforta Kamena halo de Uljanovska regiona biblioteko.

La gastoj kun plezuro partoprenis kvizon pri la bardo, kiun preparis Sergeo Abramov. Temis ankaŭ pri vivo kaj kreado de V.Visockij, pri liaj filmaj kaj teatraj roloj. Ni aŭskultis ankaŭ franclingvajn kantojn en lia plenumo.

Nia honora gasto Anatolij Dergunov kantis kelkajn kantojn de la granda bardo, unu propran kanton, dediĉitan al Vladimir Visockij, kaj poste gitarakompanis nin dum esperantlingva plenumado de la kantoj "Matena gimnastiko", "Kanto pri amiko", "Lirika kanto". Niaj klubanoj laŭtlegis la versaĵojn de Vicockij en Esperanto, kaj niaj gastoj – en la rusa. La partoprenantoj estis kontentaj pri amika etoso de la aranĝo, ĉar kunvenis samideanoj, kiuj ŝatas kaj ĝuas la kreadon de la granda poeto, aktoro kaj bardo.

Sergeo Abramov (Uljanovsk)



la partoprenintoj post la festa vespero

Henry Longfellow

LA SAGO KAJ LA KANTO

traduko de L. Novikova

Ekpafis mi sagon en bluan aeron.
Ĝi flugis momente kaj falis sur teron;
Trapikis la spacon kun tia rapid',
Ke mi ne sukcesis ĝin teni en vid'.

Elblovis mi kanton en bluan aeron.
Ĝi flugis momente kaj falis sur teron;
Kaj ĉu ekzistas sur ter' unikul',
kaptonta la flugon de kant' per okul'?

Post longa tempo, post serĉo en vago
En trunko de kverko troviĝis la sago;
Kaj mia kanto sen la serĉofar'
Eksonis en koroj de la amikar'.

Klara Ilutoviĉ (Elektrostalj)

DENOVE ANOMALIO

Kial vintro persistas
Resti preskaŭ aprile
Kaj obstine rezistas
Cedi l' tempon facile?

Suno brilas viglige –
Kaj neĝvento ekblovas!
Vintro kvazaŭ intrige

Sin reteni plu provas.

Ekdegelis jam neĝo,
Varmas eĉ dematene –
Kaj denove sieĝo
De glaci' frostrevene!

Ree blu' de glacio
Neĝkovrite insidas.
Taŭzas la emocio:
Jarjuniĝ' ne rapidas!

Ne ekverdas folioj,
Roja bru' ne elanas...
Premas anomalioj,
La naturo malsanas.

JAPANIO, EKDE LA 11-A DE MARTO 2011

Tertrem' kaj cunamo.
La plago tempestas.
Inundoj kaj flamo
Hororon sugestas.

Ondegoj impetas
Altmure al bordoj.
La ter' droni pretas
En skuoj kaj tordoj.

Nek hejmo nek forto.
Amas' da viktimoj.
Orgio de l' morto.
Kriantaj animoj.

La vivon konkeras
Terur' de disfalo.
Ĉu grave suferas
L' atoma centralo?

La hom' jarojn portas,
Venkante l' vivkuron,
Sed li plu senfortas
Por venki l' naturon.

Mikaelo Bronŝtejn

Gratuloj por la jubileuloj

Por Viktoro Aroloviĉ



- 2-
(melodio de V.Ŝainskij por "Kanto de krokodilo Geĉjo")

Tra flaketoj brilantaj
kun gratuloj kaj kantoj
kuras ni en plej bona
humor',
ĉar alvenis la dato,
tiu tag' atendata –
jubileo de nia Viktor'.

Aĥ, Viktoro, de l' tutkoro
ĉiuj ni gratulas vin.
Ja nur foje venas ĝoje
viaj sesdek kvin.

Ĉion tenas Viktoro
en senfunda memoro,
do l' respondon posedas li tuj
pri l' eventoj kaj aktoj,
dokumentoj kaj faktoj,
eĉ skandaloj en Esperantuj'.

Ĉiu horo de Viktoro
Pasas laŭ la strikta plan',
Kaj ni ĝoje vidas foje
lin eĉ sur ekran'.

La agado rutina,
aktivado obstina -
elektita por ĉiam la pad'.
Dankas por la laboro
per adoro kaj gloro
kaj estimo la tuta movad'.

Aĥ, Viktor', do bona sorto
En la mondon ĵetis vin.
Sane vivu kaj aktivu
Ĝis cent sesdek kvin!

- 1-

Vian elstaran erudicion
Inter ceteraj meritoj publikaj
Konas la land' multe pli ol alion.
Tamen pli gravas por espaj amikoj
Organizemo kun krea fervoro,
Racipensemo ĉe gravaj kunsidoj.
Ontaj pranepoj por via laboro
Al vi dankemos pro l' saĝaj decidoj,
Rave trovitaj por voj-itinero,
Orde metitaj en la dokumentoj.
Levos estimon al nia afero
Oble utilaj solvoj prudentaj.
Vin, oponeman al vanto profana,
Inde agantan, adoru kaj gloru
Ĉiam la rondo samideana.



Por Klara Ilutoviĉ

Pri inaj aĝoj oni ne parolas,
sed niaj datoj venas kun obstin'.
Uzante la okazon do, mi volas
sinceranime nun gratuli vin

ne pro la aĝo, tamen, sed, unue,
pro digna kaj talenta versfarad'.
Jes, ofte mi envias, kiom flue
vi gvidas vortojn laŭ poema pad'.

Gratulu, due, mi pro l' kunlaboro,
ĉar, vere, dank' al via inventem',
tradukoj, plenumitaj kun fervoro,
konservis guston de l' poemoj mem.

Kaj trie – pro ĝentila komprenemo,
pro l' diskutado paca kun kreiv'.
Ja pli facilas solvo de l' problemo,
se oni trovas ĝin en paca viv'.

Kaj fine, kion diri pri la aĝo? –
Ne gravas tute ĝi, se en la kor'
ĉeestas kaj prudento, kaj kuraĝo,
kaj vervo por impeta plulabor'.

Kuraĝu do, kaj en labor' impetu,
leviĝu sor de l' ŝlima vivrutin',
kaj en kulturon nian versojn metu,
donitajn malavare de l' destin'.

Al Gennadij Ŝilo

Gennadij Miĥaliĉ, karulo!
De l' esperantista medi'
rapidas gratul' post gratulo
hodiaŭ omaĝe al vi!

Anima imun' kontraŭ rusto,
facilaj paŝado kaj spir'.
Pli justas do Moskvo kun "Justo",
kaj ĝi estas via akir'.

Studentoj akceptas sen vanto,
strebante al hela estont',
ke ilin nur kun Esperanto
atendas sukces' en la mond'.

La iniciatoj defiaj
pri l' UKo, eldonoj, AIS –
jes, iom ŝoketaj, sed viaj –
tre gravaj do, kiel premis'.

L' revuo aperas regule,
la klub' vizitendas kun ŝat', -
ja endas paroli gratule
kaj danke pri via agad',

deziri dum tag' datrevena,
ke ankaŭ en la perspektiv',
venadu al vi, kara Gena,
prospero kaj bon' por la viv'.

